

1/2019

Januaro  
Februaro

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Helpu al Pola Esperanto-Asocio
- ★ Vizitinda kultura festivalo en Lelów
- ★ Literatura konkurso kaj verko "Am-lingvo"

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodz@wp.pl](mailto:rk-lodz@wp.pl)

## **Kunlaboro**

T. Nemere, M. Tatara,  
A. Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2019 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj  
Cifereca (pdf)  
Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.  
Polan Esperantiston eblas aboni per  
Konto de PEA en UEA: peaa-v;  
Detaloj troviĝas ĉe:  
<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>  
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

**BŁĘKITNE STUDIO**

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

## **Estraro de PEA**

Aleksander Zdechlik - prezidanto  
Teruo Matsumoto - vicprezidanto  
Robert Kamiński - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Agnieszka Mozer - estrarano  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Reproso kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Aleksander Zdechlik prezidanto de Pola Esperanto-Asocio

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Estraro informas</b>	
<i>Aleksander Zdechlik</i> , La 38-a Pola Esperanto Kongreso, Łochów 31.05 – 2.06.2019	3
<i>Robert Kamiński</i> , Helpu al Pola Esperanto-Asocio .....	5
<i>Robert Kamiński</i> , Bankokontoj de PEA .....	7
<b>Eventoj</b>	
<i>Zbigniew Matczak</i> , Esperanta Printempo en Szczecin 2019 .....	7
<i>Jadwiga Greger</i> , Ekspozicio pri Józef Golec en Sopot .....	10
<i>Przemysław Wierzbowski</i> , Jakobo Šapiro – unu el dek bjalistokanoj de la jarcento	10
<i>Ilona Kutny</i> , Interkulturaj diskutoj en Poznań .....	12
<b>Mojose</b>	
<i>Romualda Jeziorowska</i> , Anonco pri festivalo en Italio .....	14
<i>Romualda Jeziorowska</i> , Nova refreŝigita informilo de Pola Esperanto-Junularo ...	14
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Roman Dobrzyński</i> , Hungara fiŝista supo .....	15
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Irek Bobrzak</i> , Kaoso en la E-vortaro de plantoj .....	18
<i>Przemysław Wierzbowski</i> , Dancu sen fino, samideanino – kiel ni revivigis unikan Esperanto-opereton .....	22
<i>Robert Kamiński</i> , Aliĝado al UEA kaj TEJO .....	24
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Kultura festivalo en Lelów .....	25
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , „La” ĉe propraj nomoj – unua parto .....	29
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Eva Baloghne Fodor</i> , Am-lingvo .....	31
<b>Saĝulaj pensoj</b>	
<i>Anton Oberndorfer</i> , Daŭrigi la kreskadon de Esperanto .....	35
<b>Leterkesto</b>	
<i>Jagoda Greger</i> , Esperanto sur la strando 2019 - "Najbaroj" .....	36
<i>Jindřiška Drahotová</i> , Amika invito .....	37
<i>Przemysław Wierzbowski</i> , Kio nova, pri nova monumento al L. Zamenhof? .....	37
<b>Kalendaro</b>	38
<b>Forpasis</b>	
<i>Jan Becker</i> , Teodozja Sulima, Andrzej Szydłowski .....	31
<b>El fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki</i> , 24 - a Pola Esperanto-Kongreso, Krakovo 23-29.08.1986 .....	42

### Karaj legantoj

Jam finiĝis malnova jaro kaj venis sekvonta. Oni povas iom resumi pasintan jaron. Laŭ elekta trijara periodo en Pola Esperanto Asocio jaro daŭras ĝis somera Pola Esperanto-Kongreso. Ni renkontiĝos en urbo Łochów kaj tie ni devas elekti novan estraron. Dum tiu grava kunveno ni devas diskuti pri stato de nia asocio. Ĉu ĝi estas bona ŭ ne. La plej grava problemo por Ĉefa Estraro estas sidejo en Varsovio. Luadkostoj estas altaj kaj ni povas vivi ĉi tie danke al nia subluanto kiu pagas tri kvaronoj de luadkostoj kaj ukupas duonon de la sidejo. Ĉu tio daŭros longe? Ni esperas ke jes, tamen... Rezigno de subluanto povas esti por ni katastrofa. Ni kun granda peno kolektas monon por mankanta parto de luadkostojn. Tio bedaŭrinde okupas multe de niaj fortoj. En enhavo de tiu ĉi numero mi prezentas du manieroj kiel helpi al PEA. Danke al Fondaumo FaniMani ni povas kolekti iom da monoj por nia organizaĵo. Duan helpmanieron per 1% de nia imposto mi malkovris lastatempe. Multaj personoj jam transdonis sian PIT-formularon al Trezora Oficejo. Malgraŭ tio helpebleco ankoraŭ estas. Bonvolu legi atente priskribon de du helpmanieroj. Ankaŭ tre helpus al nia financa stato libervolaj donacoj senditaj al nia ĉefa bankokonto. Eĉ 5-10 zlotoj monate estus por ni grava. Jam sufiĉas pri mono ni revenu al nia ĉefa celo - Esperanto.

Alproksimiĝas somero kaj multaj polaj tradiciaj Esperanto-aranĝoj. La plej proksima estas Esperanto-Printempo en Szczecin, kies program ni prezentas. Ankaŭ varsovia filio kaj Ĉefa Estraro partoprenas en diversaj eventoj dum kiuj ni povas prezenti Esperanton. Ne ĉiujn mi listigis en kalendaro.

Mi rekomendas legadon kaj poste partoprenon en interesa aranĝo en urbo Lelów. En la numero ni daŭrigas fotokronikon de Andrzej Sochacki kiu ĉi foje invitas nin al 1986 jaro. La riĉa programo de 24-a Pola Esperanto-Kongreso povas esti inspira por aliaj organizantoj. En ĉapitro literaturaĵoj ni volas prezinti al vi la plej interesaj verkoj el bjalistoka literatura konkurso kiu iom fortiĝis kaj daŭras jam 8 jarojn. Mi kore invitas al legado kaj kunkreado de nia revuo.

*Robert Kamiński*

Aleksander Zdechlik

## La 38-a Pola Esperanto Kongreso Łochów - 31 majo – 2 junio 2019



La 38-a Pola Esperanto Kongreso okazos *en Łochów* en mazovia vojevodio sub honora patroneco de la urbestro s-ro Robert Mirosław Gołaszewski.

**Amaskomunikila patroneco:** Pola Retradio.

**Kongresa temo:** Historio de la Zamenhof-familio.

**Organizanto:** Pola Esperanto-Asocio

**Tempo:** 30.05-2.06.2019 (vendredo, sabato, dimanĉo)

**Loko:** Łochów, mazovia vojevodio

**Kongresejo:** Konferenca salono en la fervoja stacidomo, ĉe la str. Dolna

**Programo** – prezidanto anoncas programon laŭ la nuna stato

**Ĵaŭdo** - la 30-a de majo 2019

- 18:00 -19:00 gazetara konferenco

**Vendredo** - la 31-a de majo 2019

- Antaŭtagmeze akcepto de gastoj en kongresejo – konferenca salono en la fervoja stacidomo

- 15:00 – 16:00 solena malfermo de la Kongreso
- 16:00 – 16:15 enkonduko kaj prezentado de kongresa programo
- 16:15 – 17:00 prelego „Beleco kaj historio de la urbo Łochów”
- 17:00 – 17:50 filmo pri Lidia Zamenhof
- 18:00 - 18:50 prelego „Intervjuo vivanta amikino de Lidia Zamenhof”
- 19:00 - 19:50 kantegzercado kun la duopo *Kajto*

### **Sabato** la 1-a de junio 2019

- 08:30 - 12:00 ekskurso al la koncentrejo *Treblinka*, paralele - Ĝenerala Kunsido de PEJ.
- 15:00 - 17:30 diskuto pri „Pola Esperantisto”, prelego „Kiel monhelpi al Pola Esperanto-Asocio”, diskuto „Problemoj de la pola esperanta movado”.
- 18:00 – 19:45 koncerto de la ensemblo „Kajto” (ekstere)
- 20:00 – 20:50 egzercado – Kiel uzi fejsbukon

### **Dimanĉo** la 2-a de junio

- 08:30 – 9:30 Sankta meso (en la apudpalaca preĝejo)
- 10:00 – 13:30 Ĝenerala Kunsido de Pola Esperanto-Asocio (pole)
- 10:00 – 13:00 promenado en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo
- 16:00 – 17:00 solena fermo de la Kongreso

### **Tranoktoj:**

Kongresanoj tranoktos en la hotelo *Pałac Łochów*, ĉe la str. Konopnickiej 1, en luksaj ĉambroj (1-3 personaj) jam ekde ĵaŭdo la 29-a de majo. **Prezo:** 75,00 zł po unu nokto. En la prezo estas enkalkulita matenmanĝo.

Post elĉerpiĝo de lokoj, organizantoj havas rajton proponi alian hotelon kun aliaj prezoj.

Rimarko: Membroj de Pola Esperanto Junularo tranoktos en liceo, la str. Wyspiańskiego 18

**Manĝado:** Memstara. Proksimaj manĝejoj: Restoracio *U Zamoyskiego*, str. Marii Konopnickiej 1, - 0,3 km de la palaco, Restoracio *Łochowianka*, str. Żytnia 52, - 1,6 km de la palaco

**Aliĝotizo:** 35,00 zł

**Aliĝoj:** Aliĝilojn sendu al la retadreso: [aleksander.zdechlik@gmail.com](mailto:aleksander.zdechlik@gmail.com) aŭ al la poŝta adreso: Polski Związek Esperantystów, O/Gliwice, skr. poczt. 21, 44-100 Gliwice kun informo pri kvanto da tranoktoj kaj elektitaj ekskursoj. Nepre enskribu kontaktadreson (prefere retadreson) kaj telefonnumeron.

Aliĝoj validas post la enpago (nur por poloj) kaj ili estos akceptataj ĝis la 20-a de majo 2019. Post tiu dato organizantoj ne povas garanti tranoktadon.

**Enpagoj:**

Pagu al: bankokonto de PEA nr 90 2130 0004 2001 0558 6110 0018 kun alskribo – Kongreso en Łochów, kaj via nomo

En sendita monsumo devas esti aliĝkoto 35,00 zlotoj kaj tranoktkostoj (kvanto de tranoktoj x 75,00 zł). Post rezigno, la enpago ne estos redonebla.

**Kromaj informoj:**

La urbo Łochów situas ĉe la fervoja linio inter Varsovio kaj Bjalistoko. Ne ĉiuj trajnoj haltas en Łochów. Bonvolu atente kontroli trajnhoraron.

Ni kore invitas vin al Łochów en bela mazovia regiono. Venu al 38-a Pola Esperanto Kongreso. Aliĝilon vi trovos en retejo <http://www.esperanto.pl/>.

---

*Robert Kamiński*

## Helpu al Pola Esperanto-Asocio

Ĉiuj scias, ke la organiza agado kaŭzas kostojn. Esperantistaj organizaĵoj ĉiam sentas tiun problemon. Ni estraranoj laboras senpage, sed por aliaj aferoj oni devas pagi. Temas pri printado de E-informiloj, energio, korespondado ktp. Varsovia Filio de PEA havas propran sidejon. Luadkostoj estas altaj kaj ne sufiĉas por tio tre altaj membrokotoj en la varsovia filio. La propra sidejo (kun E-biblioteko) estas tre grava. Ĝi servas ankaŭ por Ĉefa Estraro kaj por Pola Esperanto Junularo. Eksterlandaj gastoj ofte estas akceptataj ĉe la strato Andersa en Varsovio. Organizaĵo devas havi almenaŭ unu reprezentan sidejon, kiu permesas serioze trakti ĝin. Ĉefa estraro kaj varsoviaj esperantistoj ĉiam klopodas trovi monhelpon. Efika maniero por la monsubteno estas lerta aĉetado per interreto. Mono, kolektata tiamaniere, ne estas impona, sed ĉiu helpo estas tre grava. Enreta aĉetado fariĝis tre populara kaj ofta – preskaŭ ĉiutaga. Aĉetante en 1030 enretaj butikoj vi povas monsubteni Polan Esperanto-Asocion. Kiel fari tion? Maniero estas tre simpla. Aĉetu ion helpe de la retejo <https://faniMani.pl>. Ĝis 2.5% de la kvanto de aĉeto estos akreditata, kiel donaco, al la PEA-konto.

Jen tri simplaj paŝoj:

1. Venu al retejo [www.fanimani.pl](http://www.fanimani.pl)
2. Elektu helpon por Polski Związek Esperantystów.
3. Aĉetu ion. Se vi unuan fojon aĉetas en elektita vendejo vi devas registriĝi.

Inter retvendejoj vi povas trovi: Allegro, RTV-AGD, LOT, BookingCom kaj centojn da aliaj.

Dua maniero kiel akiri 1% de nia imposto por la Pola Esperanto-Asocio helpe de fondaĵo FaniMani.

FaniMani Fondaĵo havas la statuson de OPP – Organizo de Publika Utilo (Organizacja Pożytku Publicznego). Plenumante siajn statutajn celojn - apogas neregistarajn organizaĵojn kaj lernejojn, kolektane monon por iliaj statuta agado. La fondaĵo ebligas al ĉiuj registritaj en FaniMani organizaĵoj (kiuj ne havas la statuson de OPP), uzi 1% de imposto kolektita de la Fondaĵo FaniMani.

FaniMani Fondaĵo ne prenas ajnajn kotizojn. Transdono de kolektitaj tiamaniere financoj al organizaĵoj okazos la 31-an de aŭgusto 2019. (supozante ke la Trezora Oficejo realigos la pagojn por 1% de la detalaj celoj ĝis la fino de julio 2019).

Impostpaganto, por donaci al PEA 1% de sia imposto, devas enskribi en formularo PIT 37 jenajn tri informojn:

- nomo de fondaĵo: Fundacja FaniMani
- ĝia KRS-numero: 0000507234
- kodo dela detala celo (cel szczegółowy) 22781.

(ne skribu nomon de PEA, nur kodon de nia organizaĵo). La kodo 22781 estas registra kodo de PEA en FaniMani.

Jen simplaj paŝoj por provizi unu procenton por PEA.

- En deklaro PIT-37, en la kampo 123, skribu **“KRS: 0000507234”** (se jam tie estas iu KRS, forstreku ĝin kaj subskribu)
- En la kampo 126 skribu **“Fundacja FaniMani”** kaj la kodon de la detala celo **“22781”** (se tie jam ekzistas nomo de alia organizaĵo, forstreku ĝin kaj subskribu).

Se vi jam sendis vian deklaron al Trezora Oficejo, vi povas sendi ĝin denove. Vi nur devas, en la kampo 10, signi per kruceto kvadraton n-ro 2 “korekta” kaj korekti nomon de fondaĵo, KRS-numeron kaj la detalan celon laŭ la supra priskribo.

Per tiu metodo mi jam transdonis al PEA 82 zlotojn.



## Bankokontoj de PEA

Samideanoj demandas min pri bankokontoj de PEA. Sur la kovrilo de Pola Esperantisto ni montras nur bankokonton por abono de PE. Nun mi prezentas niajn la plej gravaj kontojn en Volksvagen Bank. Por fakturoj estas ankaŭ bezonata numero NIP - dek-cifera kodo uzata por identigi impostpagantojn en Pollando. Jen la numero de PEA - NIP: 526-105-56-75

- 64 2130 0004 2001 0558 6110 0001 – Ĉefa bankkonto (ankaŭ por libervolaj mondonacoj al kiu devas akompani la frazo „Darowizna na cele statutowe”)
- 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002 - Pola Esperantisto (Skribu ekz. „Abono de Pola Esperantisto 2019).
- 80 2130 0004 2001 0558 6110 0004 – Varsovia filio de PEA
- 53 2130 0004 2001 0558 6110 0005 - La Ondo de Esperanto – PEA estas peranto de tiu revuo. La revuo nun estas eldonata en cifereca formo.
- 90 2130 0004 2001 0558 6110 0018 - Pola Esperanto-Kongreso

## Eventoj

Zbigniew Matczak

### Esperanta Printempo en Szczecin 2019

Temo de la aranĝo: „Szczecin ŝanĝiĝas” 26-28.04.2019

Karaj geamikoj, la 26-an de aprilo 2019 komenciĝos la sesa Esperanta Printempo en Szczecin, ĉi-jare dediĉita al la konstanta ŝanĝiĝado de nia bela urbo. Ni planas viziti rekonstruitan ĉekastelan malnovan kvartalon kaj troviĝantan tie iaman urbodomon, kun muzeo dediĉita al la historio de Szczecin. Poste, el la 53 metrojn alta katedrala turo, ni povos admiri panoramon de la tuta ĉerivera parto de la urbo kaj aŭskulti tie, kiel ĝi ŝanĝiĝis dum la lastaj jaroj.



© Mateusz War / Wikimedia Commons

Kiel kutime, la aranĝon komencos koncerto en Szczecin-Filharmonio. Sabate posttagmeze, okazos artaj programeroj kaj prelegoj en la festosalono. Dum tiuj ambaŭ vesperoj ni kafoklaĉos, regalataj per hejmpreparitaj kukoj kaj manĝaĵoj. Sube vi trovos la programon kaj organizajn informojn. Ĝis la revido aprile!

## Programo

### Vendredo - 26 de aprilo 2019

Ekde 14:00 – Akceptado de partoprenantoj en la internulejo de Centro de Salesiana Societo (CSS), ĉe la strato Ku Słońcu 124. Kiel pasintjare, nia bazloko troviĝos en Salesiana Centro. En tiu komforta loko troviĝas internulejo, kie dormos niaj gastoj, la festosalono, kie okazos plejmulto da programeroj, manĝejo, kie ni komune manĝos kaj kafoklaĉos. La Centro estas facile atingebla per tramo aŭ buso.

17:00 – Komuna tagmanĝo (CSS)

18:15 – Forveturo al la urba Filharmonio ĉe la strato Małopolska 48

19:00 – Vespere la Filharmonio prezentos simfonian, 3-partan koncerton de diversaj komponistoj: – Jan Sibelius – Violona koncerto d-moll op.47,- Witold Lutosławski – “Livre pour ochestre”,- Piotr Czajkowski – Romeo kaj Julia – uverturo – fantazio por orkestro.

22:00 – Kafoklaĉo kun hejmpreparitaj kukoj kaj manĝaĵoj (anstataŭ vespermanĝo)

### Sabato - 27 de aprilo 2019

9:00 – Komuna matenmanĝo (CSS)

10:00 – Komuna foto

10:30 – Forveturo al la urbo. Dum la ekskurso ni promenos tra la stratetoj de la rekonstruita kvartalo, ĉe la Kastelo de Pomeraniaj Princoj. Poste ni vizitos Muzeon pri Historio de Szczecin, kiu troviĝas en la malnova urbdomo, kies fundamentoj devenas de la 13-a jarcento. Sekve, ni iros al la

Arkikatedrala Baziliko al Sankta Apostolo Jakobo, kie per lifto ni atingos panoraman punkton, situita en la katedrala turo, je alteco de 53 metroj. De tie ni rigardos panoramon de la urbo kaj aŭskultos rakonton pri la plej interesaj ŝanĝoj en la urbo, kiuj okazis dum la lastaj jaroj.

14:30 – Komuna tagmanĝo (CSS).

16:00 – Muzikkoncerto de violonista kvarteto kaj akordiona dueto de la Ŝtata Muziklernejo. Pasintjare, ĉarmaj junulinoj, dum la mallonga koncerteto, tiel plaĉis al aŭskultantoj, ke ni decidis denove inviti ilin, ĉi-foje kun iom pli longa prezentado de verkoj de Johano Strauss. Krome, prezentiĝos dueto de junaj akordionaj virtuozaĵoj.

17:00 – Spektaklo de la grupo “Szczecinianie”, kiu prezentos popolajn dancojn kaj kantojn.

18:00 – Prelego de Edeltraud Henning pri ŝia urbo Prenzlau.

18:45 – Elpaŝo de la gastoj (se okazos volontuloj).

19:30 – Komuna vespermanĝo.

20:30 – Koncerto de Halinka Róžanek kaj ŝiaj amikoj. Nia talenta klubanino Halinka, kun helpo de amikoj, prezentos sian programon kaj certe invitos nin al la komuna kantado.

21:30 – Kafoklaĉo kun hejmpreparitaj kukoj kaj manĝaĵoj (ĝis frumatenoj)

### **Dimanĉo - 28 de aprilo 2018:**

8:30 ~ 9:00 – Sankta Meso en Esperanto – (Malgranda Kapelo de CSS aŭ la loka preĝejo).

10:00 – Komuna matenmanĝo (CSS).

11:00 – Adiaŭo de partoprenantoj (CSS).

### **Informoj de organizantoj**

La pago - 250 zlotoj, kovros ĉiujn organizajn kostojn: tranoktadon (2-personaj ĉambroj en la loka internulejo) kaj manĝadon por unu partoprenanto. Por eksterlandanoj, la kostoj estos respektive 60 EUR. La internulejo ne ofertas viŝtukojn, do ne forgesu kunporti la proprajn. Se vi devos forveturi antaŭ la dimanĉa matenmanĝo, bonvolu informi nin dum la akceptado – oni preparos por vi manĝopaketon. Per la sekva ligilo vi povas trovi aligilon, kiun vi povas sendi skanitan al niaj retadreso (sube) aŭ vi povas sendi ĉiujn datumojn en la rekta retmesaĝo. Se vi havus demandojn, ne hezitu kontakti nin:

Kristoforo – lobacz.k@onet.eu , tel. +48 601 725 335

Irena – irena-tomaszewska@o2.pl, tel. +48 502 327 701

<http://esperanto.szczecin.pl/wp-content/uploads/2018/12/Invitilo-2019.pdf>

## Ekspozicio pri Józef Golec en Sopot



Vespere, la 11-an de decembro 2018, en la sidejo de Triurba Esperanto-Societo “Toronto”, okazis malfermo de la ekspozicio, dediĉita al Józef Golec. La renkontiĝon ĉeestis la vidvino - Danuta Golec, kiu transdonis al nia Societo esperantaĵojn. La ekspozicion oni povas rigardi ĝis la fino de marto 2019. En nia Klubejo, ĉe la str. Armi Krajowej 94 en Sopot.

Post la morto de Józef Golec, la vidvino Danuta transdonis al nia Societo “Toronto” librojn verkitaj kaj eldonitaj de ŝia edzo. Nun ni havas iun kvanton de tri titoloj (pollingvaj) por vendi (10 zł) aŭ transdoni al E-kluboj, E-societoj. “Słownik Biograficzny Esperantystów Polskich”, „Gdański Ruch Esperancki 1907-2007”, „Esperanckie Ekslibrisy i Koronki”.

---

Przemysław Wierzbowski

## Jakobo Ŝapiro – unu el dek bjalistokanoj de la jarcento

La 19-an de februaro 2019 pasis 100 jaroj depost kiam Bjalistoko ek troviĝis en liberigita Pollando. Tiutage la urbaj aŭtoritatoj okazigis aron da eventoj, inter kiuj estis vespera festo en Podlaĥia Operejo. Dum ĝi oni prezentis 100 la plej gravaj aktivulojn de nia urbo el la jaroj 1919–2019. El la centoj estis elektitaj dek homoj, kiujn speciala ĵurio trovis la plej influaj kontribuantoj je disvolvado de la urbo. La unua premiito estis esperantisto Jakobo Ŝapiro (1897–1941), sekretario de Bjalistoko, verkisto, ĵurnalisto, aŭtoro de la unua gvidlibro tra Bjalistoko, fervora prezidanto de Zamenhofa Esperanto-Societo, mortpafita de nazioj, jam memorigita per tabulo, sur lia loĝdomo en la centro de Bjalistoko kaj ekde 2007 – per strato.

La premion de la urbestro de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski, nome de Bjalistoka Esperanto-Societo, akceptis ĝia prezidanto Przemysław Wierzbowski.



La aliaj 9 premiitoj estas:

- Seweryn Nowakowski (1894–post 1939), urbestro de Bjalistoko
- Mikołaj Kawelin (1864–1944), bjalistoka sporta kaj socia aktivulo
- Mordechaj Tenenbaum (1816–1943), komandanto de la ribelo en la bjalistoka geto
  - Stanisław Bukowski (1904–1979), arkitekto, rekonstruanto de Bjalistoko post la dua mondmilito
  - Irena Białówna (1900–1981), kuracistino, organizantino de la postmilita pediatrio en Bjalistoko
  - Edward Kisiel (1918–1993), bjalistoka episkopo
  - Ryszard Kaczorowski (1919–2010), la lasta prezidanto de Pollando en ekzilo
  - Jerzy Maksymiuk – (1936–), dirigento kaj komponisto
  - Tomasz Frankowski (1974–), bjalistoka futbalisto





Przemysław Wierzbowki ricevas premion de la Prezidento de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski

fotoj: *Stanisław Dobrowolski FZ, BES*

---

*Ilona Koutny*

## Interkulturaj diskutoj en Poznań

La februara interlingvistika sesio de UAM (2-8.02.2019) donis lokon al interesaj interkulturaj konfrontoj, ja 10 gestudentoj alvenis el 8 landoj (Brazilo, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Koreio, Rusio kaj Usono). En la familia etoso okazis la diskutoj dum la kursoj de Ilona Koutny, gvidantino de la Studoj. Enkadre de la aplikata lingvistiko, aperis temoj kiel tradukado el kaj al Esperanto, leksikografio kaj terminologio, komputa lingvistiko, lingva planado kaj seksismo en la lingvo en diversaj landoj.

Pragmatiko koncentriĝis je la lingva formo de ĝentileco en diversaj kuntekstoj kaj sociaj rilatoj de la interparolantoj.. Ni komparis la influon de



kulturo al diversaj lingvoj kaj serĉis spurojn en Esperanto. Ni spertis, kiel eblas agi per lingvo de promeso ĝis agresemo.

Enkadre de la Esperanta gramatiko, la partoprenantoj esploris la signiforilatojn inter vortoj kaj malkovris Esperantajn frazeologiaĵojn, ili serĉis eblajn lingvotavolojn en Esperanto. Estis prezentata la deveno kaj evoluo de Esperanto. La konata eldonisto (Sezonoj) kaj verkisto Aleksander Korĵenkov skizis la historion de la Esperanto-movado.



Prelego de Aleksander Korĵenkov

La komuna vespero estis gaja, kun la kontribuo de gestudentoj (deklamoj, kantoj kaj ludoj). La sesion akompanis agrabra turismado en Wrocław, kun la helpo de la lokaj esperantistoj.



Ĉe esperantistoj en Wrocław

Ĝoja, la studentino el Ĉinio, pretigis filmeton, en kiu la studentoj prezentas sin kaj sendas siajn bondezirojn al Amiens, Francio, al la gestudentoj de iama partopreninto de la Pedagogia Seminario en Poznań.

La filmeto spekteblas:

<https://www.facebook.com/watch/?v=612433362517432>

## Mojose

*Romualda Jeziorowska, Pola Eesperanto Junularo*

### Anonco pri festivalo en Italio

Kadre de la interŝanĝprogramo PEJ-GEJ-IEJ, ni invitas membrojn de PEJ partopreni **senpage** belegan festivalon en Italio, en la regiono Emilio-Romanjo! Pasigu unu semajnon ĉe la maro en Rimini, ĝuu la sunon kaj esperantan amikaron.

Internacia Junulara Festivalo okazos ekde la 17-a de aprilo ĝis la 23-a de aprilo, dum Pasko. Organizantoj promesas ke la nura afero, kiu mankos al vi dum la festivalo estos enuo ;)

Legu pri IJF: [ijf2019.altervista.org](http://ijf2019.altervista.org)

Legu la regularon de la interŝanĝo: [pej.pl/eo/intersango-ijf/](http://pej.pl/eo/intersango-ijf/)

Kaj nepre sendu vian kandidatiĝon kaj motivigleteron ĝis la 17-a de marto al [estraro@pej.pl](mailto:estraro@pej.pl)!

---

### Nova refreŝigita informilo de Pola Esperanto-Junularo

Ni fiere anoncas, ke ekde ĉi-jaro Pola Esperanto-Junularo havas novan version de nia interreta bulteno - PEJ-aktuale! Iuj el niaj membroj povas memori la antaŭan "aktuale" dissendatan kelkfoje jare, kiu traktis precipe pri venontaj kaj rekomendindaj eventoj. Krom informi pri nia agado kaj planataj renkontiĝoj, nun ni volas ankaŭ prezenti interesajn tekstojn pri Esperanta junulara movado en Pollando, esprimi niajn opiniojn pri diversaj Esperanto-rilataj aferoj kaj vigele diskuti kun niaj legantoj.



Ni invitas ĉiujn niajn membrojn, ŝatantojn kaj amikojn, abonon PEJ-aktuale ĉe [pej.pl/eo/aktuale/](http://pej.pl/eo/aktuale/) - tie elŝuteblas ankaŭ la unua numero, aperinta februare.

Se vi volas kontribui kaj verki por nia bulteno, kontaktu nin: [estraro@pej.pl](mailto:estraro@pej.pl)


## Raportoj, rakontoj

*Roman Dobrzyński*

### Hungara fiŝista supo

Aprilo 1957. Granda evento en mia deknaŭa vivjaro. La virga vojaĝo eksterlanden! Mi akiris ŝancon partopreni la unuan post la milito esperantistan ekskurson el Pollando al Hungario, Rumanio, Bulgario kaj Jugoslavio. Nia grupo konsistis el dek unu personoj, gvidataj de Jan Woźniak, lerta esperantisto kaj funkciulo de Klubo de la Altmontaraj Turistoj. Fakte, nek mi, nek aliaj grupanoj kiam ajn grimpis sur montopintojn. Jan Tymiański, la aŭtoro de la pola-esperanta vortaro, estas sufiĉe aĝa sinjoro. Lia samaĝulino, eleganta sinjorino Helena Fethke, ankaŭ ne aspektis montaranino. Ŝi estas edzino de la eminenta esperantisto Edmund Fethke, aŭtoro de la unua post la milito lernolibro de la lingvo internacia „1000 vortoj de Esperanto”. Decas aldoni, ke tiun ĉi lernolibron kunaŭtoris lia frato Jan Fethke, tiutempe fama pola filmreĝisoro, kaj en la Esperanto-movado konata kiel verkisto Jean Forge. La resto de la grupo estis gejunuloj. Ni devis ekzameniĝi pri la scipovo de Esperanto, sed neniu demandis nin pri spertoj en montgrimpado.

Dum la tempo de stalinismo la individua turismo estis entute malpermesita. Kvankam tiu epoko finiĝis oktobre 1956, privataj vojaĝoj apenaŭ povis realiĝi. Tamen, en tiel nomataj socialismaj landoj, jam eblis vojaĝi, sed kolektive kaj sub ŝildo de iu institucio. Ĝuste la Klubon de Altmontaraj Turistoj uzis Jan Woźniak kiel formalan pretekston por nia ekspedicio. Li sukcesis ligi kontaktojn kun Esperantaj asocioj en la supre menciitaj landoj kaj aranĝis ĉiujn formalajojn de la vojaĝo. Li tenis la komunan pasporton por la tuta grupo, komunan fervojan bileton kaj eksterlandajn devizojn. Laŭ tiu ĉi sistemo, la grupanoj povis vivi nur en simbiozo kun la gvidanto, kaj ekster li ni tute ne ekzistis.



Ni estis kuriozaj montgrimpanoj, kiuj transportis sin de loko al loko per trajnoj, plej ofte laŭ valoj, nur fojfoje rigardante montojn tra fenestroj. La unua celo estis Budapeŝto. Kiam nia vagonaro estis enveturanta la stacidomon Keleti, nia grupo staris ĉe malfermitaj fenestroj. La gvidanto etendis eksteren Esperantan flagon. Sur la kajo troviĝis multaj personoj, kiuj ekvidinte la verdan stelon, kuris apud nia vagono, ĝis kiam ĝi haltis. Estis por ni granda surprizo, vidi tiom da salutantaj samideanoj. Niaj grupanoj, forlasante la vagonon, estis tuj kaptataj. Mian dekstran manon kaptis unu viro kaj la maldekstran la alia. Ili tiris

min dekstren kaj maldekstren kiel pendolon, ĝis fine venkis la dekstrulo. Li prezentis sin kiel Jozefo Szary kaj invitis min al sia hejmo. Montriĝis, ke ĉiuj alvenintaj samideanoj volis havi gastojn, ĉar ni estis la unuaj post la milito eksterlandaj esperantistoj, venintaj al Budapeŝto, sed la plimulto revenis hejmen sen predo.

La unuan fojon en mia vivo mi veturis per metroo kaj, ĉeokaze, mi devis akcepti la faman informon, ke sur la eŭropa kontinento la unua urba subtera fervojo estis konstruita en Budapeŝto. La ĉefurbo de Hungario forte impresis min, kiel loĝanton de Varsovio, ĉar nia ĉefurbo post la milito ankoraŭ restis grandparte ruinigita. Nia familio loĝis en unu ĉambro, sen la propra akvo kaj necesejo. Tiuj ĉi loĝkondiĉoj draste kontrastis kun la plurĉambra apartamento de mia hungara mastro - la loĝejo, plenigita per elegantaj mebloj, lustroj kaj pentroartaj bildoj. La ronda tablo estis kovrita per porcelanaj teleroj kaj arĝenta manĝilaro. Bonvenigis min la familianoj kaj kelkaj invititaj esperantistoj. Ĉiuj parolis Esperanton. Ĝi eksonis por mi la unuan fojon ne kiel lingvo de la kursa konversacio, sed kiel aŭtenta

rimedo de la inernacia interkompreniĝo. La mastrino Katalin petis ĉiujn eksidi, ŝi starigis sur la tablon vaporantan vazon kaj triumfe anoncis: *Jen nia nacia plado, haláslé, la supo de fiŝistoj!*

Dum ŝi ĝentile disverŝadis la supon en telerojn, Jozefo aludis la tradician amikecon inter hungaroj kaj poloj, eternigitan en la malnova proverbo, kiun li citis Esperante: *Polo, hungaro la amikoj ĉe batalo kaj kaliko*. Mi konfirmis pollingve: *Polak, Węgier dwa bratanki i do szabli i do szklanki*. Kaj mia najbaro konkludis hungare: *Lengyel, magyar két jó barát, együtt harcol s issza borát*. En la estiĝinta etoso de la hungar-pola solidareco ne necesis referenci al la hungaro Batory, kiu estis reĝo de Pollando en la 16-a jarcento, nek al la polo Bem, kiu gvidis la hungaran revolucion en la 1848-a jaro. Sufiĉis tute freŝaj eventoj, okazintaj duonon da jaro pli frue. En oktobro 1956, poloj ekribelis kontraŭ la komunisma Sovet-Unio, kaj hungaroj, kuraĝigitaj de nia relativa sukceso, ekagis same. Sed, tiukaze kruele intervenis la sovetia Ruĝa Armeo.



Stratoj de  
Budapeŝto post  
ribelo en 1956

La mastro Jozefo ŝirmis la fenestrojn per kurtenoj, klinis la kapon direkte al mi kaj flustre rakontis pri la teruraj eventoj okazintaj antaŭ ses monatoj: tankoj, soldatoj, pafado kontraŭ manifestanta homamaso, kadavroj, ĝemo de vunditoj, tumulta paniko, bruego.... Aŭskultante la korskuan raporton, mi tenis jam kelkan tempon kuleron plenan da supo kaj subkonscie verŝis ĝin en la buŝon... El miaj okuloj ŝprucegis larmoj! Jozefo, vidante miajn larmojn, ankaŭ ekploris. Ĉiuj aliaj leviĝis, kunplektis manojn kaj ploris. Nu, post kelkaj minutoj, la kolektiva etoso influis min ekplori sincere, sendepende de la supo.

\*\*\*

Tiun ĉi eventon oni povas konsideri kiel kolizion de civilizacioj. La pola kuirarto ne konis tiel fortajn spicaĵojn. La hungara *haláslé* montriĝis por mi infera substanco. Sed mi ĝojas, ke eĉ supo povas grave roli en firmiĝo de amikeco inter popoloj, kiu ja estas la ĉefa celo de nia ideo.

## Pri kio ni aŭdas

*Irek Bobrzak, Varsovia Vento*

### Kaoso en la E-vortaro de plantoj

Ne ĉiuj interesiĝas pri plantoj. Klare. Verdire, malmultaj kapablas ilin distingi laŭ nomoj, eĉ en sia gepatra lingvo. Floroj kiel rozo, lilio aŭ tulipo estas vaste konataj. Same legomoj, kiujn ni uzas. Terpomo, rizo, karoto, brasiko aperas ja ofte sur niaj teleroj, simile, kiel tomato, salato kaj kukumo. Tamen, nomojn kiel gageo, eŭforbio aŭ ornitogalo plej ofte oni ne konas, kvankam tiuj plantoj kreskas preskaŭ ĉirkaŭ ni. Orientiĝo en la plantoregno iĝas eĉ pli komplika pro specioj (legu suban vortaron). Al la roza genro, ekzemple, apartenas pli ol 350 ilin, inter kiuj esperantigitaj estis rozo blanka, hunda, pomodora, sulka, felta. Provu do distingi ĉiujn speciojn kaj, krome, memori iliajn nomojn, sen la profunda studo de la temo.



Laŭ la gvidata kunlabore kun la botanikaj scienco-institutoj kaj universitatoj listo „The Plant List”, oni povas paroli hodiaŭ pri 642 plantaj familioj, en tio pri 17 020 plantaj genroj kaj pli ol mil specioj de ili. La specioj dividiĝas je akceptitaj, sinonimaj kaj deaktualigitaj. La sinonimajn, kiuj validis iam, oni povas trovi en la malnovaj botanikaj libroj, vortaroj, ĉar, dum fluo de tempo de la genetikaj esploroj kaj malkovroj, evidentiĝis, ke temas pri alia planto-deveno ol oni komence supozis. Tiel aperas ŝanĝoj de nomoj sur la specia, genra aŭ eĉ familia niveloj, ekz. pulsatilo ordinara, en la scienca lingvo *Pulsatilla vulgaris*, iĝis *Anemone*

*pulsatilla*, ĉar oni malkovris, ke tiu bela printempa floro ne al pulsatioj apartenas, sed al anemonoj. Malgraŭ la fakto, ke inter la botanikistoj daŭras senĉesa batalo je argumentoj kaj diskutoj pri la esploroj, ili elektis unu lingvon por prezenti planto-nomojn, la sciencan. Ne. Taksonomiaj nomoj de plantoj, kvankam kreataj laŭ reguloj de la latina gramatiko, havas fontojn en multaj aliaj lingvoj. Ekzemple, la tre ŝatata miozoto, de multaj konata ankaŭ kiel neforgesumino, venis el la greka: *Myosotis*, kio signifas “musa orelo”. Longe mi cerbumis, kial iu idioto tiun ĉarman ĉiel-bluan floron nomis tiel stulte. Sed estas io en tio. Atente pririgardu la foliojn kaj tuj vi komprenos.

La temo, ĝenerale, estas kiel rivero - larĝa kaj longa. Ne artikolon do, sed ampleksan libron pri tio oni povus verki. Tamen, revenu ni surteren kaj rigardu, kiel tio ĉio rilatas al Esperanto. La unuajn esperantigojn de plantoj kreis Ludoviko Zamenhof mem. Sekvis lin la pioniroj, kreintoj de la unuaj vortaroj, inter ili Antoni Grabowski kaj Kabe. Tiam, kio klaras, temis pri herboj, arbustoj, arboj kaj ties floroj, fruktoj kaj legomoj konataj. Poste, venis la tempo de fakaj prilaboroj. Matematiko, kemio, fiziko kaj inter multaj ankaŭ botaniko trovis interesiĝon. La plej ampleksan, ĝis nun, vortaron de plantoj por studentoj de botaniko eldonis REF, Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj. Kaj estus bele, se ankaŭ tiu kampo de scienco ricevus ian Fundamenton. Bedaŭrinde, tiel ne okazis, kvankam mi malkovris provojn reguligi la temon. Tamen, kiel ofte en Esperantujo, krom klaĉoj, nenio disvastiĝas rapide, do botanikistoj, scienculoj kaj inter ili entuziasmuloj esperantigadis nomon post nomo, ofte sen scio pri agado de la aliaj kaj sen interkonsento. Kiel fungoj post pluvo aperadis, paralele, po kelkaj nomoj de la sama planto. Menciita jam miozoto, konata estas ankaŭ kiel neforgesumino, galanto kiel neĝborulo, lilako kiel siringo, ktp. Kiun nomon elekti por lernolibro? Tiun aŭ tiun? Kiun eklerni? Ambaŭ? Se temus nur pri du nomoj, ne estus vere signifa problemo. Sed, multaj plantoj havas po tri, kvar, eĉ kvin diversajn nomojn! Abio blanka troveblas



en vortaroj ankaŭ kiel abio arĝenta aŭ kombila, krome abieso, kaj temas ja pri la sama specio de pinglo-arbo, nome: *Abies alba*. Kverko robura, *Quercus robur*, prezentata estas ankaŭ kiel kverko tiga, tig-frukta kverko kaj somerkverko. Kaj tiuj ekzemploj ne estas esceptaj.

Mi diskutis pri la temo kun esperantisto lingve pli klera ol mi. Li konstatis. – Nature, Esperanto ja evoluas! En ĉiu etna lingvo estas tiel. Depende de regiono, ofte oni nomas la saman planton alie. – En ordo. – Respondis mi. – Tamen, ne pri iu etna lingvo temas, sed pri Esperanto! Se la internacia rondo de botanikistoj, kiuj ja ne havas statute komunan lingvon, trovis solvon, ĉu la esperantistaro, kiuj havas komunan lingvon, tion ne kapablas? Denove ripetigās demando: kiun nomon, ekzemple de *Abies alba*, elekti por prezenti ĝin en la nova lernolibro? Ĉu estu ĝi blanka, arĝenta aŭ kombila?

Tiuj, kiuj konas historion de Esperanto, scias, ke ekde komenco estis problemoj. Ni do vidas, "tranĉilo en dorson de la ideo" evidentiĝis ja ne nur Ido, la rivala lingvo, kreita sur sino de la esperantista movado. Tamen, malgraŭ malfacilaĵoj, la lingvo internacia komencis evolui, pri kio zorgis la Majstro mem, sekve la Lingva Komitato kaj la Akademio. Por eviti eraran vojon de Volapuko, ĝuste pri sovaĝa kaj nekontrolata kreado de malsamaj esprimoj por samaj aferoj, en Esperanto, ĝenerale, unu vorto rilatas al unu esprimo. Diablo scias, kial tiun koncepton ne sekvis samideanoj, kiuj ekinteresiĝis pri esperantigo de planto-nomoj.

Facilas kritiki - mi scias. Ne plendojn tamen mi celas, sed solvon de la problemo. Dum pli ol kvar jaroj,, mi kolektas publikigitaj ie ajn esperantigojn de la planto-nomoj. Pacience mi trarigardas vortarojn, librojn pri botaniko kaj plantoj, diversajn publikaĵojn. Sur la kreita en la reto labortablo de ĉiuj 17 020 plantaj genroj kaj iliaj specioj mi notas, kion mi trovas, foje mi aldonas komentojn, rimarkojn pri diversaj eraroj. Kaj, kio gravas en tiu agado, mi ne laboras sole. En la rondo de kunlaborantoj, krom kelkaj volontuloj, troviĝas ankaŭ fakuloj pri plantoj. Kaj ne pensu, ke temas pri ia lingva revolucio sur la kampo. Simple, estas neceso ordigi la planto-vortaron, por restu nur unu nomo por unu planto. La kromaj, kompreneble, ne pereos. Ili, laŭ la saĝa scienca sperto, iĝos sinonimoj, kiujn facile oni povos trovi. Ĉe la okazo, nomoj de multaj konataj plantoj, kiuj ankoraŭ ne estas esperantigitaj, eĉ tiuj, kiujn mi kultivas sur parapeto en mia hejmo, ricevos interkonsultitajn nomojn en Esperanto.

Kial mi dediĉis min al la temo? Simple, ĉar mi havas ĝardenon. Do, se ankaŭ vi havas ĝin, aŭ pli ol kutime vi interesiĝas pri plantoj kaj ĝiaj nomoj, aliĝu al la projekto. Bonvenon! Sincere mi invitas.



## Vortaro

taksonomi/o. Scienco pri la distingo de la taksonoj kaj ilia rangigo kaj loko en la klasifiko de la vivuloj. -> nomenklaturiko, sistematiko.

famili/o (3) Sistematika unuo (familia) ampleksanta parencajn genrojn, kun rango malsupera al ordo, supera al genro, montrata en botaniko per la suf. ac, en zoologio per la suf. ed: familio de rozacoj, de akcipitredoj.

genr/o (2) Sistematika unuo (genus), konsistanta el natura grupo de parencaj specioj, subdivido de familio.

speci/o (1) Baza sistematika unuo (species), subdivido de genro aŭ de subgenro, konsistanta el la tuto de la individuoj, similaj inter si escepte de malgravaj karakteroj, kiuj povas kruciĝi kaj produkti idojn reproduktokapablajn. (2) (analoge) Klare difinita tipo de mineralo aŭ de petro: biotito k muskovito estas specioj de glimo.

subspeci/o. Grupo de individuoj (subspecies) apartenantaj al unu sama specio, sed diferencaj de alia grupo en la sama specio pro malpli gravaj heredaj ecoj. -> gento, raso, vario.



---

### La taksonomiaj nomoj post ordigo

#### Taksonomia rango

	Science	Esperante	
Familio:	<i>Pinaceae</i>	pinacoj	pinglo-arboj
Genro:	<i>Abies</i>	abio	sin. abieso
Specio:	<i>Abies alba</i>	abio blanka	sin. abio arĝenta; abio kombila
Sinonimoj:	<i>Aies vulgaris</i>	abio ordinara	
	<i>Abies nobilis</i>	abio nobla	
	<i>Pinus picea</i>	...	

---

Plantoscienco aŭ botaniko (greke, βοτάνη: herbo), neoficiale ankaŭ plantologio (laŭ NPIV per greka postafikso, λόγος: traktado) aŭ fitologio (greke, φυτόν: planto), estas la studado de plantoj kaj ĝenerale de la plantoregno. Ĝi estas branĉo de la biologio.

## Dancu sen fino, samideanino – kiel ni revivigis unikan Esperanto-opereton

Feliks Hiller apartenas al tiuj Esperanto-verkistoj, pri kiuj, malgraŭ la siatempa populareco, hodiaŭ ni havas tre malmultajn informojn. Li, pola judo, verkis ĝis nun unusolan opereton en nia lingvo: temas pri „Ho, tiuj fremduloj!”. Ĝi estis eldonita libretforme en la bjalistoka eldonejo de Jakobo Ŝapiro (unika ankaŭ kiel la sola opereto, kiu ekvidis la mondon en nia urbo).



Vilna Juda Landkona Societo  
prezentas scenon el la opereto

La intrigo de la verko estas operete simpla, por ne diri banala: ekskursas grupo de diverslandaj esperantistoj, inter kiuj okazas diskutoj pri diferencoj gentaj kaj seksaj, ĵaluzoj, sopiroj, amindumoj... Ĉio estas saturita per naivaj, sed ĉarmaj antaŭmilitaj movadaĵoj, verdeco, la stelo, la sankta celo Esperanta ks. Estas malfacile hodiaŭ imagi surscenejigon de la verko de Hiller, tamen, antaŭ 1939 ĝi estis nekredible populara inter esperantistoj, ĉefe en Pollando, plurfoje ĝi estis prezentata dum bjalistokaj postkongresoj kaj jubileaj renkontiĝoj far de la teatra sekcio de Zamenhofa Esperanto-Societo.

La dua mondmilito falĉis la polan Esperanto-movadon; la bjalistoka esperantistaro, antaŭe forta, tute malaperis. La opereto estis forgesita por jardekoj. Komence de 2018, Tomasz Chmielik, kun kiu de jaroj ni kunlaboras eldonante Esperantajn librojn, proponis reeldoni ĉi tiun polvokovritan verkon. Ni reeldonis la tekston libroforme, speciale por la naskiĝtago de LLZ. Ĉeokaze, Tomasz donacis al ni la originalan ekzempleron de „Ho, tiuj fremduloj!” el 1923: danke al li, la serio *Esperanta Librotrezoro* de Ŝapiro estas kompletigita kaj en Bjalistoko ni havas ĉiujn originalajn eldonaĵojn de li.





Tomasz Chmielik prezentas la originalan tekston, kiun li donacis al Bjalistoka Esperanto-Societo, kaj la noveldonitan de ni libron.

Lech Mazurek, la estro de la muzika ensemblo Frey-Lech Trio, interkonsentis kun siaj kolegoj (Katarzyna Breczko – soprano, Joanna Gryko – violono kaj aldonita al la grupo Krzysztof Halicki – baritono) kaj decidis muzike prilabori du kantojn el la opereto, por kiuj kaj la tekston, kaj la melodion verkis Hiller. Plej verŝajne la kantoj, kiuj ravis bjalistokajn esperantistojn en la 1930-aj jaroj, eksonis inter la muroj de Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko la 15-an de decembro 2018, unuafoje post 80 jaroj, okaze de la 19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj. Ankaŭ vi povas aŭskulti ilin:

<https://espero.bialystok.pl/eo/dancu-sen-fino-samideanino-kiel-ni-reviviĝis-unikan-esperanto-opereton/La filmojn akompanas subtekstoj>.

Muzika ensemblo  
*Frey-Lech Trio*  
prezentas  
fragmenton de la  
opreto dum  
Bjalistokaj Zamenhof  
Tagoj en 2018



## Aliĝado al UEA kaj TEJO

Lige al la artikolo de UEA-prezidanto Mark Fetes en PE 6-2018, mi prezentas al vi la novan prezaron, laŭ membrokategorioj. Ĉu la nova sistemo de membrokotizoj helpas plinombrigi membrojn de UEA? Venontaj jaroj montros, ĉu tiu ĉi, unua post la longa tempo kaj iom revolucia eksperimento, estos efika. Mi jam renovigis mian membrecon. Bonvolu legi la suban tabelon.

<b>MB</b> — Membro Baza, kun reta aliro al UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro).	14 EUR
<b>MA</b> — Membro-Abonanto, kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon <b>Esperanto papere</b> .	44 EUR
<b>DMB</b> — Dumviva Baza Membreco (kiel MB, sed dumvive). DMB = MB x 30 →	420 EUR
<b>DMA</b> — Dumviva Membro-Abonanto (kiel MA, sed dumvive). DMA = MA x 30 →	1320 EUR
<b>MB (-50%)</b> — Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro estas 20—25-jara je la komenco de la kotizata jaro).	7 EUR
<b>MB (-75%)</b> — Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro ne estas pli aĝa ol 19 jaroj je la komenco de la kotizata jaro).	4 EUR

Ĉiuj individuaj membroj de UEA ricevas **rabatojn** en la Libroservo de UEA kaj por aliĝado al Universala Kongreso de Esperanto.

Membroj en TEJO-aĝo (malpli ol 36-jaraj je la komenco de la kotizata jaro) ricevas ankaŭ la revuon "Kontakto": papere, se la elektita kategorio estas **MA** aŭ **DMA**, aliokaze retan. Nepre indiku la naskiĝdaton!



Robert Kamiński

### Kultura festivalo en Lelów

Hodiaŭ mi volas inviti vin al Lelów, 35 km oriente de Częstochowa. En la eksa urbo (1354-1869) kaj nun vilaĝo (kie vivas ĉirkaŭ du mil loĝantoj) denove dum tri tagoj okazos kunveno de poloj kaj judoj. Vidinda estas ne nur la loko, sed ankaŭ evento, en kiu valoras partopreni.

En Lelów, meze de aŭgusto, okazos la Festivalo de Pola kaj Juda Kulturo - kaj la Festivalo de *Ciulim - czulent* (*legu Ciulim - ĉulent*) (Lelowskie Spotkania Kultur). Vere valoras veni ĉi tien, se vi interesiĝas pri la unika interpenetrado de tiuj du tradicioj.



La festivalo estas unu el la plej grandaj kaj plej gravaj tiutipaj eventoj en Pollando. Ĝi intencas rememori la komunan historion de poloj kaj judoj, montri la interpenetradon de kulturoj, instrui toleremon kaj reciprokan komprenon. La Festivalo konsistas el serio da eventoj, kiuj intencas ebligi pli bone ekkoni kaj kompreni la judan

kulturon kaj rememorigi ĝian signifon por la pola kulturo kaj por la kulturo de Lelów. Ĉeestas ĝin loĝantoj de Lelów, najbaroj, turistoj el la tuta Pollando, kaj ĥasidoj el Israelo. La unua tago de la festivalo estas vendredo. Vendredaj kunvenoj estas pli intelektaj kaj edukaj. En ĉi tiu tago okazas prezentaĵoj de filmoj, kiuj temas pri judaj temoj, konferencoj kaj kunvenoj kun spertuloj pri judaj aferoj kaj kulturo. La dua tago de la festo - sabato - estas dediĉata al la pola kulturo. La pola tago temas ĉefe pri la pola folkloro. La dimanĉa kunveno, en la kadro de la Festivalo Ciulim - Czulent, donas al polaj partoprenantoj okazon lerni pri la juda kulturo. Dum la juda tago sur la scenejo regas klezmer-muziko, kiu iam estis kunligita kun la religiaj ritoj, kaj kun tempopaso ĝi iĝis distra muziko. Tia programo de festoj, emfazante

la distingon de ĉi tiuj du kulturoj, samtempe permesas la kombinaĵon de elementoj, karakterizaj por ili. La Festivalo Ciulim - Czulent, kiu ĉefe rilatas al amuzo, muziko, gustumado de diversaj regionaj pladoj, ankaŭ havas grandajn edukajn valorojn pro la ekspozicioj, kunvenoj, atelieroj kaj konkursoj organizataj ene aŭ ĉirkaŭ la festivalo.

*Czulent* estas tradicia plado de la juda kuirarto. Ĝi estas pretigata, inter alie, el malrapide kuirata koŝera viando, en la formo de gulaŝo. Ciulim estas ĝia pola formo, kiu en la versio de "Ciulim lelowski" ricevis ateston de regiona kuirarto. Ĉi tiu plado venigas nin al Lelów.



Foto <http://lthk.pl/aktualnosci/xiv-%C5%9Bwi%C4%99to-ciulimu-czulentu/>

jarcento, ekzistis tie juda vitra fandejo kaj tanejoj. Lelów estis grava centro de ĥasidismo. Post la eksplodo de la dua mondmilito, multaj judoj el Lelów eskapis el la urbo. Tiuj, kiuj restis, estis deportitaj al la koncentrejo en Treblinka aŭtune 1942. Nur kelkaj travivis la jarojn de la germana okupado.

En la vilaĝo estis du judaj tombejoj. La malnova estis aranĝita en la 17-a jarcento, okcidente de la urbo. Post kiam ĝi pleniĝis, la dua juda tombejo estis fondita norde de la vojo, kondukanta al Paulinów, proksime al rivero. La ambaŭ tombejoj estis detruitaj de la germanoj dum la dua mondmilito. Dum la tempo de la Pola Popola Respubliko, sur la loko de la dua tombejo aperis komerca pavilono de la Komunuma Kooperativo "GS".

En la jaro 1988, danke al iniciato de judoj el diasporo, en la teritorio de la malnova tombejo, oni komencis serĉi la tombon de la fama cadiko\* de Lelów - Dawid Biedermann – nomata ankaŭ "Lelewer". Liaj ostoj estis trovitaj sub la menciita GS-pavilono. Trovitaj restaĵoj estis transdonitaj al la Universitato en Jerusalemo, por esplorado. En la serĉado partoprenis la rabeno Dawid Lelow, la nepo de la fama cadiko.

Meritas ankaŭ memori pri la interesa historio de Lelów, ligita kun la kulturo de poloj kaj judoj. En Lelów, multaj judaj familioj vivis jam en la unua duono de la 16-a jarcento. Fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj, la juda komunumo de Lelów nombris ĉirkaŭ 720 homojn, kio estis 60% de ĉiuj

loĝantoj. La judoj en Lelów okupiĝis ĉefe pri komerco kaj metio. Komence de la 20-a

Danke al la helpo de la *Nissenbaum Family Foundation*, la areo de la historia nekropolo estis konservita, kaj en la pavilono oni pretigis ejon, en kiu estas konstruita nova tombo de David Bidermann. Sur la interna muro troviĝas la memortabulo tabulo kun epitafo en la hebrea lingvo.

La laboro estis finita en februaro 1989. De tiam, la tombo de "Lelewer" estas la celloko de ĥasidaj-pilgrimoj el Usono, Israelo, Aŭstralio kaj aliaj lokoj. La pilgrimoj precipe alvenas dum la datreveno de lia morto, en la sepa tago de la juda monato *ŝvat*.

Ĉiujare, fine de januaro, grupo de kelkcent ĥasidoj venas al Lelów. Viroj kun barboj, kun karakterizaj judaj vangoharoj, en nigraj vestoj, kun karakterizaj ĉapeloj, preĝas tiam en la loka ohel<sup>1</sup>. La ŝlosilo al la tombo estas ĉe Roman Filewski, kiu loĝas ĉe la str. Ogrodowa 7.

En Lelów estas kelkaj arkitekturaj objektoj, kiujn indas viziti. Sur la malgranda, kvadrata herbejo, inter la Urba Kulturcentro kaj la bakejo, staras la ligna skulptaĵo, kiu portas la kruĉon kun ciulim, - simbole prezentas tipan loĝanton de Lelów.



La kvadrata merkato en Lelów, dum jarcentoj, servis kiel la urba foirplaco. La placo havas regulan formon, kun stratoj, elirantaj el la anguloj.

---

1 Ohel - Juda tombo en formo de tendo



Krom la malgrandaj aldonajoj en la orienta flanko, post la jaro 1945, oni ne ŝanĝis tie la malnovan arkitekturon.

La preĝejo al Sankta Marteno estis konstruita en la dek-kvara jarcento, fare de la reĝo Kazimiro la Granda. Post tri jarcentoj, la preĝejo estis bruligita. Ĝi estis rekonstruita en 1638 kaj plene trakonstruita. Vespere, la 4-an de septembro 1939, la germanaj okupantoj decidis bruligi ĉion, kion ili ne scipovis ŝteli - la historian templon, kaj la bildon *Nia Damo*. La templo estis bruligita, kaj ankaŭ spektakle estis bruligita krucifikso de la dekoka jarcento. Kvar loĝantojn, kiuj rifuzis ekbruligi la krucifikson, germanoj murdis. Malgraŭ la detruo, la skulptaĵo de la krucumita Jezuo mirakle postrestis. Nuntempe, ĝi estas metita en la presbiterio de la templo. La preĝejo estis rekonstruita post la dua mondmilito.



Ĥasidoj en  
Lelów 2010

<http://blog.marci nbajor.net/index.php/chasydzi-w-lelowie-2010-cz-1>

Ĉe la str. Ogrodowa, kontraŭ la iama juda tombejo, situas sinagogo – la domo de preĝado. Ĝi estas uzata nur por la pilgrimantoj al la tombo de David Bidermann Lelewer. Tiam al la sinagogo estas venigataj volvaĵoj de Tora kaj necesaj aĵoj por preĝado. Ene de la konstruaĵo ekzistas ankaŭ ceremonia mikveo<sup>2</sup>.

Por la komunumo *cadik*<sup>3</sup> estis modelo de pieco, humileco kaj justeco. Cadikoj estas ĉirkaŭitaj de la universala respekto pro sia kapablo fari miraklojn kaj sanigojn. Ankaŭ post la ilia morto al iliaj tomboj, venadas multaj pilgrimantoj. Estas multaj dinastioj de cadik-oj en la mondo vivantaj en la juda diasporo.

---

2 Mikveo - en judismo estas tutkorpa banejo servanta por la rita purigo.

3 Cadik - karisma estro de branĉo de judaismo - ĥasidismo, nomata ankaŭ *rebe*.

### La ĉe propraj nomoj – una parto

Ĉe propraj nomoj la uzado de *la* estas bedaŭrinde iom malsimpla, kaj ne tute klare fiksita.

Oni faras distingon inter normalaj propraj nomoj, ĉe kiuj oni normale ne uzas *la*, kaj ordinaraj O-vortoj kiel propraj nomoj, ĉe kiuj oni normale ja uzas *la*. (En multaj lernolibroj oni trovas la trosimpligitan regulon: “antaŭ propraj nomoj oni ne uzas *la*”. Tiu simpligo ne estas prava.)

Ankaŭ aliaj difiniloj povas uziĝi ĉe propraj nomoj.

#### Normalaj propraj nomoj

Normalaj propraj nomoj estas vortoj kaj esprimoj, kiuj estas **per si mem** propraj nomoj. Pri tio decidas la ĉefvorto de la nomo. Ekz. *Norda Ameriko* estas normala propra nomo, ĉar la ĉefvorto *Ameriko* ĉiam estas propra nomo per si mem.

Normalaj propraj nomoj ne bezonas *la*, ĉar ili ĉiam nomas ion, kion oni supozas konata de la alparolato. Teorie ili nomas unikaĵojn. Multaj propraj nomoj tamen ne estas vere unikaj, sed efektive nomas plurajn individuojn, sed kiam oni uzas propran nomon, oni normale pensas pri unu certa individuo, kaj supozas, ke la aŭskultanto komprenos, pri kiu temas. Normale estus eraro aldoni *la* al tiaj nomoj:

- *Morgaŭ mi veturos **Parizon***.FE.28 *Parizo* estas propra nomo de la ĉefurbo de Francujo. Ĝi ĉiam nomas unikan difinitan urbon, kaj ne havu *la*.

- ***Aleksandro** ne volas lerni, kaj tial mi batas **Aleksandron***.FE.9 *Aleksandro* estas propra nomo de knabo. Uzante ĝin oni ĉiam celas certan difinitan knabon, kiun la alparolato konas. Oni ne uzu *la*. Efektive ja ekzistas multaj Aleksandroj, sed kiam oni uzas tian nomon, oni ĉiam celas unu certan el ili, kiun la aŭskultanto konas.

- ***Zamenhof** kreis **Esperanton***. *Zamenhof* estas ĉiam propra nomo. Ĝi ne havu *la*. *Esperanto* estis unue kaŝnomo de Zamenhof. Nun ĝi estas propra nomo de lia lingvo. La vorto *esperanto* estas ordinara vorto (= “persono, kiu esperas”), sed la lingvonomo estas rigardata kiel tute alia vorto.

Ĉiuj landonomoj estas traktataj kiel normalaj propraj nomoj. Ili do ne havu *la*:

- *La rusoj loĝas en **Rusujo** kaj la germanoj en **Germanujo**.FE.40*

Fremdlingvaj propraj nomoj estas traktataj kiel normalaj propraj nomoj (sen *la*). Ankaŭ citaĵaj nomoj (de libroj k.s.) ordinare estas tiel traktataj.

### **Nomo kun rekta priskribo**

Iafoje normala propra nomo havas A-vorton kiel rektan priskribon. Se tiu A-vorto ne estas mem parto de la propra nomo, oni normale ja uzas *la*, kvazaŭ temas pri ordinara O-vorto. Tion oni faras precipe, kiam temas pri elekto (reala aŭ ŝajna) inter pluraj aferoj kun la sama nomo:

- *Duoble montriĝis la bildo de Venero, de **la surtera Venero**.FA1.213*  
Venero estas propra nomo de diino. Unue *Venero* aperas sen *la*, laŭ la bazaj reguloj por normalaj propraj nomoj. Poste ĉeestas la rekta priskribo *surtera*, kaj oni devas uzi *la* por montri difinitecon. Temas kvazaŭ pri du malsamaj Veneroj, la ĉiela Venero kaj la surtera Venero.

- ***La malgranda Janjo** per larĝe malfermitaj okuloj rigardis la murojn.M.6*

- *Ĉiuj konas **Londonon**, la ĉefurbon de Britujo, sed ne ĉiuj konas **la aliajn Londonojn** en Usono kaj Kanado. Londono ne havas *la*, ĉar ĝi estas klare difinita per si mem. La esprimo *aliaj Londonoj* tamen havas la priskribon *aliaj*. Oni do devas uzi *la*, ĉar oni parolas pri ĉiuj aliaj Londonoj.*

- *Multaj vizitis Londonon, la ĉefurbon de Britujo, sed mi vizitis ankaŭ **aliajn Londonojn**. Ankaŭ ĉi tie Londono havas priskribon, sed oni ne uzu *la*, ĉar ne temas pri ĉiuj aliaj Londonoj, kaj la aŭskultanto ankaŭ ne povas scii, precize pri kiuj Londonoj temas.*

- *Tio ĉi estas ne stilo de **bona Esperanto**, sed stilo de malklera homo.LR.119* Ĉi tie mankas *la*, ĉar *bona Esperanto* ne estas uzata por identigi certan lingvon, sed por paroli pri speco de lingvaĵo.

Se temas ne pri elekto inter pluraj aferoj kun la sama nomo, sed pri diversaj partoj de unu afero, tiam oni normale ne uzas *la*, kvankam ĉeestas A-vorta priskribo:

- *Eŝvajlero situas en **meza Rejnlando** en Germanujo en **meza Eŭropo**. Ne temas pri pluraj Rejnlandoj aŭ pluraj Eŭropoj, sed pri la meza parto de Rejnlando kaj la meza parto de Eŭropo.*

- *En **orienta Azio** multaj landoj evoluas tre rapide. = En la orienta parto de Azio...*

Se rekta priskribo de normala propra nomo ne estas A-vorto, sed alispeca priskribo, tiam oni normale ne uzas *la*. Nur se tia priskribo servas



emfaze por fari distingon inter pluraj individuoj kun la sama nomo, oni povas uzi *la* por tion klare montri:

- *Tio estis **Kristino el la erikejo***.FA3.94 *El la erikejo* estas rekta priskribo de la nomo *Kristino*, sed ĝi ne estas A-vorto.
- *Mi ekskribos pri ĉio al **Trjapiĉkin en Peterburgo***.Rz.66
- *Pasintjare mi vizitis Berlinon, sed ne **la Berlinon de Germanujo***. *Mi vizitis unu el la multaj Berlinoj en Usono*. Ĉi tie temas klare pri distingo inter pluraj urboj kun la sama nomo, kaj *la* estas bezonata.
- *Mi daŭre revas promeni tra **la Parizo de 1900***. La parolanto pensas pri la tiama Parizo kvazaŭ alia urbo ol la nuna Parizo.

Se A-vorta priskribo mem estas parto de la propra nomo, oni normale ne uzas *la*:

- *Brazilo estas la plej granda lando en **Suda Ameriko***. La kontinento nomiĝas *Suda Ameriko* (aŭ *Sud-Ameriko*). La A-vorto estas parto de la nomo.
- *Sankta Petro. Sankta Johano*. En tiaj ĉi nomoj de sanktuloj la priskribo *Sankta* estas kiel parto de la nomo, tial *la* ne estas uzata. Ĉe Zamenhof oni tamen trovas tiajn nomojn ankaŭ kun *la*. Kiam sanktula nomo aperas kun *la*, povas esti, ke fakte temas pri festotago, preĝejo aŭ simila afero, kiu estas nomita laŭ tiu sanktulo: *la Sankta Bartolomeo*Rn.24 = “la preĝejo de Sankta Bartolomeo”.

## Literaturaĵoj

Lastjare Bjalistoka Esperanto-Societo anoncis literaturan konkurson. Al la konkursa komisiono venis pli ol 20 verkoj. Hodiaŭ ni prezentas al vi rakonton de Eva Baloghne Fodor, kiu ricevis la unuan premion.

*Redakcio*

*Eva Baloghne Fodor*

## Am-linguo

Feliĉaj tagoj! Mi feriumas kun mia nepino!

Ni estas kune, nure ni: la plej olda, kaj la plej juna virinoj el la tuta familio.

Ni lasis ĉion hejme: la ĉiutagajn taskojn - lerneajn de ŝia flanko, laboreajn kaj dommastrinajn de la mia kaj ankaŭ aliajn familianojn, kaj ni

veturis al unu el miaj plej ŝatataj urbetoj, kiun mi vizitis jam plurfoje. Kvankam ĝi estas eksterlande, ni devas vojaĝi ne longe – dank’ al la modernaj, rapidegaj trajnoj.

La unuan fojon ankoraŭ en mia junaĝo, poste – iom maljuniĝante, sekve komencante nostalgii – de tempo al tempo, kiam mi havis iom da tempo kaj mono por tiu vojaĝo, ĝuante kaj admirante ĝiajn beliĝantajn, renovigitajn partojn.

Ekvidante la ĉef-placon de la urbeto – meze kun la ĉevala statuo pri la urba famulo, *poste iĝinta nacia* heroo – ĉiam kortuŝas min tiu pitoreska, familia etoso, kiun unuafoje mi sentis tie.

Kiel tiam, ankaŭ nuntempe ĝi estas populara rendevuejo de la lokaj gejunuloj. Sidante sur la ŝtupoj ĉirkaŭ la statuo ili babiladas, ridadas, amindumas. Same, kiel tiutempe...

Ni estis junaj kaj belaj. Jes, per mia cerbo mi jam scias, ke vere belaj, kvankam tiam mi estis konvinkita, ke nepre mi devus iom ŝanĝiĝi por esti belulino – iĝi pli maldika kelkajn kilogramojn, pli alta kelkajn centimetrojn, havante pli grandajn/pli malgrandajn korpopartojn, pri kiuj nur la junulinoj pensas, ke ili gravas plej multe.

Hodiaŭ, post pluraj jardekoj, mi jam scias, kiel tutpravas Eta Princo (t. e. Saint Exupery): vere allogaj kaj belaj estas nevideblaĵoj por la okuloj - oni vidas bone nur per sia koro.

Do, ni estis energi-plenaj, iom naivaj, sed antaŭ ĉio: tre, tre geamantaj. Eble niaj pensoj naskiĝante estis



vortoj de niaj gepatraj lingvoj, sed laŭte dirante jam ili sonis en Esperanto, en tiu lingvo, kiu tiutempe iĝis pli kaj pli populara inter la gejunuloj. Ĝi funkciis vere kiel ponto, kiun trairante ni povis interkomuniki senprobleme; eĉ kun anoj de tiuj landoj, kies lingvojn studi en nia patrujo ankoraŭ signifis seriozajn malfacilaĵojn.

Ni konatiĝis en internacia junulara Esperanto-renkonto, organizita en mia urbo.

Partoprenante la diversajn programerojn, „hazarde” ni ĉiam sidis aŭ

staris unu apud la alia. Post 1-2 tagoj ni jam paroladis multe-multe: pri nia vivo, studado, hobiaj. Ni instruis unu al la alia diversajn ge-patrajn esprimojn, ridante multe, pri la ĉarme mallertaj akcentoj.

Dum la Granda Balo – memkompreneble – ni dancis nur unu kun la alia, kaj inter la dancoj diligente ni serĉadis lokojn - malpli bone lumigitajn – por ŝanĝi kisojn.

Post la balo, kiam jam ĉiuj foriris al la noktejoj, Li ankoraŭ akompanis min ĝis nia loĝejo, kaj la „Ĝis!” povis eksoni nur post longa-longa adiaŭo.

Nur sekvontmatene mi eksciis, ke Li malfruiĝis al la lasta tramo al sia *noktejo, kaj Li devis trairi* - perpiede, nokte - ĝuste la plej longan ponton en mia urbo.

„Dum mia marŝado mi povis pensi nur pri tio, ke verŝajne ĝi estas la plej longa ponto en la tuta mondo!” – konfesis Li sekvonttage, ridetante.

Lian hejmenrevenon sekvis senfina korespondado – kompreneble perpoŝte, ĉar interreto tiam ankoraŭ ne ekzistis.

Poste sekvis la vizitadoj reciprokaj, kun prezento al la gepatroj unu de la aliaj, kun planado de nia komuna estonteco, post la geedziĝo.

Kie kaj kiel? Tio estis ĉiam la ĉiutaga temo. En kiu lando, per kiu laboro, en kiu hejmo? Por kiu el ni povus esti pli facila, pli tolerebla la totala ŝanĝo?

La solvon – kiel kutime – donis la vivo mem.

La leteroj pli maloftiĝis, la vortoj pli malvarmiĝis, kaj mi tuj ekkomprenis la situacion: venis iu - alia knabino.

Dum nia lasta renkonto jam Li konfirmis tion – iom honteme, pardonpetante, sed videble feliĉe.

Kion mi povis fari? Tio doloris ankoraŭ dum longaj jaroj, sed pli kaj pli malforte...

Mia vivo tiel turniĝis, ke mi komencis okupiĝi pri instruado. Mi instruis dum longaj jaroj, preskaŭ dum du jardekoj, Esperanton. La lingvo, kiu antaŭe signifis por mi la amon, iĝis por mi mem la Amo.

Senĉese mi klopodis serĉi kaj uzi diversajn instru-metodojn, por helpi efike la gelernantojn (ĉefe plenkreskulojn), kiel eble plej facile studi kaj uzi ĉi tiun belegan lingvon.

Dumtempe mi trovis ankaŭ paron, kun kiu mi vivas jam ekde pli ol 30 jaroj, edukinte 3 gefilojn, kaj nun jam havante 2 genepojn.

Do, nun ni estas ĉi tie kune kun mia nepino. Ni ĝuas la belegan, sunan veteron, ni faras longajn promenojn sur la ĉarme malvastaj stratetoj de la urbo, rigardante la fabelecajn, kolorajn domojn, la pitoreskan pejzaĝon.

Mi gustumigas kun ŝi tiujn naciajn manĝaĵojn, kiujn mi konas helpe de mia estinta amato, kaj kiuj – verŝajne ĝuste pro tio – al mi ege plaĉas.

Dumtempe ni babildas – priparolante detale la plej gravajn aferojn de la vivo, kiel nur virinoj povas paroladi.

Kaj la trian vesperon de nia ĉi tiea restado, okazis miraklo.

La miraklo, kiun – profunde de mia koro – jam longtempe mi esperis: duone timetante, duone ĝojante, sed finfine, atendente: la r e n k o n t o. Atendante ne nur Lin, sed ankaŭ mian jun-aĝon, miajn estintajn emociojn.

De tempo al tempo mi revadis pri tiuj momentoj: kion mi sentos, kion mi diros, kion Li diros?

Jes, finfine okazis – dum nia laŭkutima vespera promenado, post la bongusta, satigita vespermanĝo.

Li – same, kiel en miaj revoj – venas fronte al ni, kaj ekkonante min (do, eble ne tiel multe mi sanĝiĝis), Li haltas.

Li ridetas, ĉarme, gaje – ho, kiel junuleca, kiel eleganta Li estas – bone videble Li volas min saluti iel...

Jes, Li diras ion – en la unuaj momentoj mi kredas, ke pro la ekscitiĝo mi ne komprenas, sed poste mi jam aŭdas, ke Li parolas en fremda – en sia gepatra – lingvo.

Mi respondus, eĉ, mi balbutas kelkajn vortojn, kompreneble Esperante...

Li nur ridetas – pardonpeteme, honteme, kaj Liaj okuloj diras al mi: „mi ne komprenas...”. Subite mi konsciiĝas: Li forgesis nian komunan lingvon.

Rapide kaj facile oni povas forgesi la lingvon neuzitan de pluraj jardekoj – ŝajne ekde tiu tempo Li ne parolis Esperante, tute ne okupiĝis pri ĝi.

Antaŭ mi staras nekonatulo – fremda homo, kun fremda lingvo kaj vivo. Forte mi sentas inter ni la barilon, sekve el la manko de nia antaŭa komuna lingvo.

Du – nun jam – nekonatuloj, sen komuna pasinteco, sen komunaj pensoj kaj vortoj.

„Ili parolas la saman lingvon” – oni diras en mia gepatra lingvo, temante pri la perfekta interkonsento. Nun ni – laŭvorte – ne parolas la saman lingvon.

Post kelkaj kortuŝaj, tute silentaj momentoj – tra kiuj neniu ekstera voĉo, neniu bruo povas penetri – sentante sur mia brako kareson, mi ekaŭdas senpacienca voĉon de mia nepineto: „Ni iru, avinjo!”

Same, kiel saluti – ankaŭ adiaŭi neblas.

Ni ekiras malrapide, nenion dirante, ne retrorigardante.

En mia koro militadas la emocioj, samtempe ĉirkaŭdancas nin la milda, suda venteto.

Mi sentas, eĉ mi scias certe: pri ĉi tiu renkonto mi parolos neniam, al neniu...

Anton Oberndorfer

## Daŭrigi la kreskadon de Esperanto



La pasintaj 30 jaroj alportis novan eraon por Esperanto. Ĝis la fino de la 1980-aj jaroj limoj kaj grandaj distancoj en komunikado estis nur malfacile supereblaj. Sed tiam okazis salto antaŭen kiu estis kaj politika kaj teknologia. Ĝi esence ŝanĝis la situacion de komunikado kaj tiel ankaŭ de Esperanto.

La politika ŝanĝo montriĝis en la falo de la "Fera Kurteno" aŭ - alie dirite - en la disfalo de la soveta imperio. El tio sekvis vojaĝeblecoj por homoj, kiuj ĝis tiam ne rajtis forlasi sian landon por viziti aliajn landojn ekster la soveta influo. En internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj de esperantistoj, ekzemple en Germanio, tiam unuafoje aperis multaj partoprenantoj el la landoj en kiuj la

komunisma regado ĵus estis finiĝinta. Tio vigligis la aplikadon de Esperanto.

Sed pli-malpli samtempe okazis teknologia ŝanĝo en komunikado. Oni ĝis tiam ja povis havi leteramikojn, sed sendi leteron al alia kontinento aŭ eĉ nur al alia lando de la propra kontinento ofte daŭris tre longe kaj tial respondo alvenis nur post semajnoj. Aliflanke telefonado al eksterlando estis ankoraŭ tre multekosta. Tio limigis la eblecojn de esperantistoj komunikiĝi.

Sed tiam aperis personaj komputiloj kaj telefakso. Per telefakso oni povis sendi eĉ manskribitajn leterojn de unu telefono al alia kaj tio kostis malpli ol la afranko de letero, kaj per telefakso la mesaĝo alvenis tuj, post minuto. Se oni havis personan komputilon oni povis sendi disketojn per **retpoŝto**. Sed ja baldaŭ poste aperis la interreto tra kiu eblis sendi tekstojn, bildojn kaj sonojn.

En la jaro 1998 mi jam starigis la Esperantan Retradion. Kaj la esperantistoj povis tiam ne nur sendi mesaĝojn per retroŝto, sed povis ankaŭ sendi pdf-dokumentojn kiuj permesis rezigni pri la multekosta sendo de presitaj revuoj. Kio ja, precipe en Esperantujo, estis granda obstaklo al la plua kresko.

La organizantoj de E-aranĝoj povis prezenti siajn aranĝojn en propra retejo. Ekzemple komence de la jaro 2000, mi aliĝis al la junulara renkontiĝo dum Pasko en Cavallino ĉe Venezia en Italio. Ĉiujn informojn mi tiam jam ĉerpis el la interreto kaj ankaŭ la aliĝo okazis per retroŝto.

Sekvis aliaj teknikaj progresoj: Aperis Skajpo, per kiu eblas senpage telefoni (eĉ kun video-bildo) tra la tuta mondo. Jutubo kaj aliaj similaj video-portaloj ebligas al esperantistoj prezenti siajn filmetojn al esperantistoj en (preskaŭ) la tuta mondo. Kaj aperis Fejsbuko, kiu kunretigas amikarojn en la tuta mondo.

Do, okazis multaj progresoj, kiuj akcelas la aplikadon de Esperanto. Kaj per interretaj kursoj nun ankaŭ milionoj da homoj lernas Esperanton. Tamen, la vera trarompo de Esperanto al pli alta nivelo de aplikado ankoraŭ ne okazis.

Estas nun du faktoroj, kiuj limigas la pluan kreskadon de Esperanto: unu estas la lingvo mem - ne sufiĉas lerni la lingvon en iu kurso. Necesas daŭre apliki ĝin je sufiĉe alta nivelo. Kaj la dua faktoro estas la enhavoj: Pri kio entute oni legu kaj parolu en Esperanto? Mankas homoj, kiuj pretas kaj kapablas prezenti interesajn enhavojn en la bona lingvaĵo. Necesus pli da senpaga laboro tiurilate.

Tio ja okazas en la Esperanta Retradio, sed estas necesa multe pli da tia internacia kunlaboro. <http://esperantaretradio.blogspot.com/>

## Poŝtkesto



*Jagoda Greger*

### Esperanto sur la strando 2019 - "Najbaroj"

Jam tradicia E aranĝo en Gdańsk, kiu okazos septembre (12.09 – 15.09), ĉijare estas dediĉita al la najbaraj etnaj regionoj: Kaszuby kaj Kociewie. La bonan nivelon de la programo garantias kunlaboro de la esperantistoj-organizantoj kun la loka etnografia muzeo kaj aplaŭdo de Kaŝuba-Pomeria Societo.

Interese estas, ke en la aranĝo partoprenos la lingvisto d-ro Paulo Hopkins el Kanado, kiu esperantlingve prezentos prelegon pri la kaŝubaj lingvo kaj literaturo.

La ekskurso al Pelplin, en la regiono Kociewie, ebligos renkontiĝon kun la tradiciaj kaj nuntempaj kulturelementoj de tiu ĉi interesa regiono.

Kiel en la antaŭaj jaroj, la partoprenantoj de la aranĝo aliĝos al la parado de neregistaraj organizaĵoj en Sopot.

Venu, partoprenu kaj ĝuu! Kore invitas ĉiujn - Triurba Esperanto Asocio "Toronto".



*Jindriška Drahotová*

### Amika invito

al la tradicia semajna seminario en Ĉeĥa Paradizo, en la familian pensionon ESPERO en la vilaĝeto SKOKOVY – 75 km nordoriente de Prago – en puran naturon de la 3-a de aprilo ĝis la 7-a de aprilo 2019.

Por homoj sanaj, handikapitaj, junaj kaj maljunaj, kiuj ŝatas Esperanton kaj deziras ĝui naturon. Oni povas ekzerci korpon kaj spiriton, krei mane memoraĵojn kaj ion alian plu...babili, frandi, promeni, ekskursi, diskuti, ludi, eĉ lerni....

La senbara, modesta medio: 2-5 litaj ĉambroj, la prezo: 450 Kč (1eŭro -27 Kč) por kompleta servo je unu tago. Necesejoj kaj duŝeoj en koridoro. Interreta konekto. Oni pagas surloke.

Kontaktoj: Jindriška Drahotová, Sadová 745/36, Mladá Boleslav 293 01.  
Tel: 420 720 652 320 drahotovaesperanto@seznam.cz

drahotova@esperanto.cz

www.sweb.cz/espero.skokovy, www.mlboleslav.cz/esperanto

www.evinatelier.cz, aeh@esperanto-ah.eu www.esperanto.cz



*Przemysław Wierzbowski*

### Kio nova pri nova monumento al Ludoviko Zamenhof?

Bjalistoka Esperanto-Societo invitas dimanĉe, la 14-an de aprilo, al eventoj honore al Lazaro Ludoviko Zamenhof okaze de la 102-a datreveno de Lia morto. En la programo estas renkontiĝo ĉe la nun konstruata, nova skulptaĵo de juna Zamenhof.

Detaloj: <https://espero.bialystok.pl/eo/memore-al-zamenhof-2019/>

# Kalendaro

Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando kaj najbaraj landoj en 2019

29-31. 03.2019	PEJ -semajnfino en Lodzo	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl
26-28. 04.2019	6-a Esperanta Printempo en Szczecin	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Szczecin. lobacz.k@onet.eu
23-30. 05.2019	4-a Internacia Majrendevuo Wroclaw - Zlotoryja	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
23.05. 2019	5-a Internacia Simpozio, Wroclaw Temo: Esperanto - disvolvado de homaj personecoj en la etapo de la junaĝo kaj la tria aĝo	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
25-26. 05.2019	7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, Wroclaw en prestiĝa loko: Filharmonia str. Piłsudskiego 19	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
11.05. 2019	Esperanto-stando dum 23-a Scienca Pikniko en Varsovio ĉe Nacia Stadiono „PGE Narodowy”	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio alvamo@wp.pl
15.6. 2019	Vizito en Sztolnia Dziedziczna - karbogalerio en muzea karbominejo Guido en Zabrze	PEA-filio en Gliwice, Aleksander Zdechlik, aleksander.zdechlik@gmail.com
16.06. 2019	Montara Renkonto Czantoria Wielka en Beskidy Montaro	suchanekj@seznam.cz
7-18. 06.2019	41-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice stanislaw.mandrak@gmail.com
31.05- 02.06. 2019	38-a Pola Esperanto-Kongreso en Łochów	Estraro de Pola Esperanto-Asocio estraro@esperanto.pl



27.07.- 05.08. 2019	Internacia Junulara kultura Interŝanĝo Pollando – Litovio. 15-a datreveno de membriĝo de ambaŭ landoj en EU.	Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz halinakomar@gmail.com
26.07.- 04.08. 2019	Esperanta stando dum PolAndRock Festival en Kostrzyn ĉe la rivero Odra.	Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo Andi Münchow, rete: andim@gmx.li
30.08.- 07.09. 2019	52-a Internacia Esperantista Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
13-15. 09.2019	Esperanto Sur la Strando - 2019 Gdynia – Sopot, temo: "Najbaroj"	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl <a href="https://sites.google.com/site/esperantowso">https://sites.google.com/site/esperantowso</a> pocie/ FB – Esperanto Sopot.pl
20-22. 09. 2019	35-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2019” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. <a href="http://www.arkones.org/eo/">http://www.arkones.org/eo/</a>
11-13. 10.2019	43-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
9-11. 11.2019	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 23 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
6-7. 12.2019	4-a Esperanta konkurso “Vortbeleco en Esperanto” Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Małgosia Komarnicka
13-15.12. 2019	20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl
27.12.- 3.01 2020	11-a JES Junulara Esperanta Semajno en Giucholazy.	Pola Esperanto-Junularo <a href="http://www.pej.pl">www.pej.pl</a>

## Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

27.12-3.01.2019	17-a Novjara Renkontiĝo (NR) - en Wiesbaden, Germanio	EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 10551 Berlin. - retadreso: lu.esperanto@gmx.de
27.12-3.01.2019	Luminesk' - en Königswinter apud Bonn, Germanio	Andreas Diemel, Andreas Diemel, Bismarckstr. 168, 47057 Duisburg, Germanio. - retadreso: andreas.diemel@web.de
3-7.01.2019	Poludnica 2019, 37-a Internacia renkontiĝo de vojaĝantoj-esperantistoj en vilaĝo Liptovský Ján Slovakio	Liptova Esperanto-klubo, Školská ul. 4, 031 01 Liptovský Mikuláš, poludnica83@gmail.com www.poludnica.esperanto.sk
7.4.2019	Semajna seminario en Ĉeĥa Paradizo pensiono Espero en la vilaĝeto Skokovy	Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, Mladá Boleslav 293 01. Tel: 420 720 652 320 drahotovaesperanto@seznam.cz drahotova@esperanto.cz
1-9.05.2019	Esperanto-renkontiĝo Mirinda Lviv - en Lvov, Ukrainio	Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. -: tel. +38 (097) 4403172, retadreso volodomir@ukr.net.
9 – 12.05.2019	TEK - Tutslovakia Esperanto-Kongreso - en Liptovský Hrádok, Slovakio	Esperantská Federácia, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio. - skef@esperanto.sk
10-16.05.2019	Esperanto-Tendaro en Kievo, ETK - Somera tendumado apud ĉefa ukrainia rivero - Dnipro	Ihor Glagolevsjkij, str. Velika Aranautska 24/6, Odessa, Ukrainio. - tourmaestro79@gmail.com
7-10.06.2019	96-a Germana Esperanto-Kongreso - en Neumünster, Germanio	Deutscher Esperanto-Bund e.V., s-ino Sible Bauer, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin. - retadreso: sible.bauer@esperanto.de
6-14.07.2019	55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Panevežys, Litovio	Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio. - retadreso: litova.ea@mail.lt
28.07-04.08.2019	75-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Liptovský Hrádok, Slovakio.	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO. - Retadreso: ijk2019@tejo.org
17-20.10.2019	Kongreso de Ĉeĥa Esperanto -Asocio en Brno, Ĉeĥio.	Estraro de ĈEA, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy, Ĉeĥio. - retadreso: cea@esperanto.cz

**17-a Novjara Renkontiĝo (NR)** - en Wiesbaden. Kutime ĉ. 150-200 gastoj, inter ili sesdeko da infanoj kaj junuloj. Apartaj programeroj por junuloj sub la nomo "Novjara Internacia Semajno" (NIS). Konversacia rondo kaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

**LUMINESK'** estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la kvaran fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj. Ĉi-foje ĝi okazos en Königswinter apud la konata rivero Rejno.

**Poludnica 2019.** Tradicia vintra renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj, organizata ekde la jaro 1983. La kuranta, kvara jardeko de la renkontiĝoj jam havas internacian karakteron kun riĉa kelktaga programo, kie, krom turismaj programeroj estas pluraj sportaj aktivecoj, prelegoj pri vojaĝoj el la tuta mondo kaj informoj pri praktikaj scioj de vojaĝantoj.

**Mirinda Lviv - en Lvov.** Esperanto-renkontiĝo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la kultura ĉefurbo de Ukrainio.

**55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj** estas tradicia esperantista aranĝo, organizata ekde 1959, laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio kun riĉa kaj serioza movada, eduka, instrua, kultura kaj ekskursiva programo.

## Forpasis

La 7-an de novembro 2018, en Wałbrzych, forpasis la longjara instruisto, junulara edukisto, vojaĝanto, esperantisto kaj bonkora homo **Jan Becker**. Entombiga ceremonio okazis la 10-an de novembro 2018, sur tombejo, ĉe la str. Poznańska en Wałbrzych.

Kun bedaŭro en la nomo de la sileziaj esperantistoj

Teresa Pomorska

Kun granda malĝojo ni informas, ke la 19-an de novembro 2018, en Wrocław, mortis la 95- jara esperantistino **Teodozja Sulima**. La adiaŭa ceremonio okazis la 26-an de novembro 2018, je la 11:00, en la preĝejo kaj sur tombejo, ĉe la str. Odonaj Bujwidaj 51 en Wrocław.

Silezia Esperanto-Asocio

Kun granda malĝojo ni informas, ke la 28-an de decembro forpasis la esperantistino **Andrzej Szydłowski**. La adiaŭa ceremonio okazis la 8-an de januaro 2019, sur la tombejo Miłostowo, ĉe la str. Gnieźnieńska en Poznań

Pola Esperanto-Asocio

## El fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

### 24-a Pola Esperanto-Kongreso, Krakovo

Ni prezentas sekvontan parton el fotoarkivo de Andrzej Sochacki, ĉiĵoj pri 24-a Pola Esperanto Kongreso. La kongreso okazis la 23-29.08.1986 en Krakovo. Ni rigardu kaj komparu ĝian riĉan programon.

La programo: - red. Teruo Matsumoto **Renkontiĝo kun Japanio** + filmo **La monto Nomugi**, - Marian Kostecki - seminario je la temo **80 jaroj de esperantista movado en Krakovo**, - Stanisław Świstak **Ekspresa Esperanto-kurso**, - dro Leszek Kordylewski **Interno de la ĉela membrano** kun lumbildoj, - Stanisław Świstak, Modest Błasiak **43-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (TEJO en Krakovo)**, - Stanisław Świstak, Włodzimierz Wesołowski **La turismaj kaj kongresaj impresoj de Pekino** kun lumbildoj, - Leo de Bruyne **Antoni Grabowski**

**La arta programo** konsistis el: - koncerto de junulara ensemblo "Małe Pieniny" de Krościenko, - Wanda Bierzyńska **Kanzon-recitalo**, - mag. Lidia Ligęza - Poezia vespero **Krakovaj Esperanto-poetoj - Juliusz Kriss**, - Jadwiga Gibczyńska **Zamenhof** - teatra monodramo, - kanzon-koncerto de la krakova

koruso "Kamea", gvidata de Zbigniew Warmuz, - Remigiusz Kossakowski **Kant-recitalo**, - prof. Marian Machura **Orgena recitalo en Tyniec**, - Wanda Bierzyńska, Marcin Borowski **Esperanta kanzon-mozaiko**.

Aliaj kongresaj kunvenoj: - de esperantistoj-vegetaranoj, - de esperanta junularo (PEJ) gvidata de de Janusz Błaszczyk, - de medicinista sekcio de UMEA gvidata de Marian Łaba, - de veteranoj kaj olduloj gvidata de M. Kostecki kaj Lech Kosieniak (dum kiu 17 pesonoj estis distingitaj per "Meritoplena Esperantisto"), - de esperantistoj-kooperativanoj gvidata de Eleonora Florkowska, - kun redakcio de "Pola Esperantistogvidata de de Barbara Pietrzak.

Kromaj programeroj: - ekskursoj al krakova urbocentro, Tyniec, Wieliczka, kastelo en Pieskowa Skała, - interkonatiĝa vespero, - kongresa balo, - libroservo, - pres-konferenco, kaj komna fotografado apud monumento de Adam Mickiewicz

Dum la Kongreso la Kongresa Organiza Komitato eldonadis „ Heroldo de la 24-a Pola Esperanto Kongreso”.

Fotis Andrzej Sochacki, Pri programo informis Lidia Ligęza kaj Grażyna Porada.



Jadwiga Gibczyńska dum teatra monodramo „Zamenhof” Prelegas Marian Kostecki





24-a PEK Kraków, 1986. Foto: Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki kun J. Wasik antaŭ  
kastelo Pieskowa Skała 26.08.1986



24-a PEK Kraków, 1986. Foto: Andrzej Sochacki

Dum ekskurso al Tyniec



Kongresa koncerto

24-a PEK Kraków, 1986. Foto: Andrzej Sochacki





Ekspozicio pri Józef Golec en Sopot



Esperantistoj en parado dum aranĝo "Esperanto sur strando"



# NIA FOTOGALERIO 24-a Pola Esperanto Kongreso

Stanislaw Ŝmistak malfermas kongreson



24 -a PEK Kraków, 1986 Foto: Andrzej Sochacki

Partoprenantoj dum koncerto



24 -a PEK Kraków, 1986 Foto: Andrzej Sochacki

Esperantistoj apud kongresa affiŝo



24 -a PEK Kraków, 1986 Foto: Andrzej Sochacki